

# Boletín

**Federación Española de Esperanto**  
**Asociación de Utilidad Pública**



**N-ro 331 • Majo - Junio 1997**

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperanta de 1949

## Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9º C  
ES-50002 Zaragoza

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell  
Miguel Fernández Marín  
Vicente Hernández Llusera  
Andrés Marín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutiérrez Adúriz  
Antonio Valén Fernández

## Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Es-28015 Madrid

Tel.+faksilo: +34-(9)1-446-80-79

esperanto@adv.es

## Estraro

Prezidanto: Antonio Alonso Núñez

Vicprezidanto: José M. Galofré Domingo

Sekretario: Manuel Parra Benito

Vicsekretario: Marcos Cruz Martín

Kasisto: José M. Bernabeu Franco  
(konto: 14.011.966, Caja Postal)

Voĉdonantoj:

Luis Hernández García

Antonio Marco Botella

Juan Antonio Cabezos

Augusto Casquero de la Cruz

Miguel Gutiérrez Adúriz

*Kovrilo: "Glorieta del Esperanto" ĵus  
inaŭgurita en la centro de Zaragoza.*

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

## Enhavo

Nia adiaĵo .....	2
Dankon Antonio ( <i>Antonio Valén</i> ) .....	3
Jarraporto de la HEF-Estraro en 1996 .....	6
56a HEF-Kongreso .....	7
Jarraporto pri la agado de Libroservo .....	8
Kontoktato de HEF-Libroservo .....	9
HEF "Balance de Situación" .....	10
Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto .....	13
Programo de la valencia kongresaro .....	14
Novajo .....	17
Viglas la movado .....	18
Amiko Juan Carlos ( <i>Augusto Casquero</i> ) .....	24
Kanaria ĉirodeputitino en Venezuelo ( <i>Juan Negrete</i> ) .....	36
Nekrologoj .....	28
La signifo de Avenpace en filozofio (Antonio Marco Botella) .....	29
HEF estas novajo .....	32

# NIA ADIAŬO

*Antonio Marco Botella*

Devige estas konsenti, ke ĉio en nia vivo havas sian finon, ĉar tio estas en la propra naturo de nia ekzistado. Kaj efektive, sen aliaj aldonaj komentoj, kaj kiel anoncite, alvenis finfine la momento de la adiaŭo de la ĝisnuna redakta skipo, kiu laboradis senhalte dum ok jaroj redaktante nian dumonatan *Boletín*.

Ni devas konfesi, ke la tasko ne estis facila por ni, precipe ĉar niaj perfektigo-aspiroj flugis pli alten ol niaj disponeblaj rimedoj. Estis tiuj ankoraŭ, la tagoj, kiam aĉeti komputeron postulis riĉaĵon, kaj HEF nur disponis kiel havaĵon ruĝajn ciferojn. Sed la fervoro kaj solidara kunlaborado de kelkaj samideanoj, vere ne multaj, faris la miraklon, ne nur forviŝi la ruĝajn ciferojn, sed de 23 paĝoj salti ĝis 32, kaj per modestaj paŝoj doni formon al pli moderna revuo: prezenti varian enhavon kun beletraj eseoj, informaj sekcioj vere interesaj kaj premieraj poemoj. Tamen la spirito de la redaktantoj sin sentis ne tute kontentaj, ĉar antaŭ kaj nun, eĉ ĝis la momento mem de nia adiaŭo, ni ĉiam volis plibonigi nian revuon, perfektigi ĝin, kaj nia sola bedaŭro en tiu ĉi momento estas nur ke ni ne atingis pli kontentigan nivelon en ĉiuj aspektoj.

Estas ne necese mencii la nomojn de

niaj kunlaborantoj, ĉar ni povis legi ilin sur la unua paĝo de nia bulteno unu jaron post alia. Tamen decas al mi kiel ĉefredaktoro danki tiujn fervorajn kolegojn, inter ili kelkajn eksterlandanojn, pro ilia konstanta laboro, kaj al la legantoj pro ilia morala helpo dum tiuj longaj ok jaroj, ĉar, jes, ne malmultaj el niaj samideanoj, adresis al ni dankajn leterojn, kelkfoje por kuraĝigi nin pro nia fervora laboro, ofte ankaŭ kun esprimoj de konstrua kritiko, en ambaŭ kazoj dankindaj sintenoj, ĉar tio signifis, ke nia tasko estis tiel grava por ili kiel por ni mem.

La Ĝenerala Asembleo de HEF okazonta en julio en Valencio elektos novan ĉefredaktoron, kaj li/ŝi, renovigos la redaktan skipon, kiu alportos junajn energiojn kaj certe pli rafinitan teknikon. Mi povas jam certigi al vi, karaj gelegantoj, ke tiuj kiuj anstataŭos nin faros sian eblon por aktualigi nian revuon kaj meti ĝin en la avangardon de la verda gazetaro. Ĝuste kiel meritas nia Movado, inter la unuaj post la naskiĝo de Esperanto, kaj ankaŭ poste de la mano de nia jam veterana Hispana Esperanto-Federacio de nia lasta epoko. Unu el miaj plezuroj estas koincidigi mian adiaŭon kiel ĉefredaktoro kun mia 60-jara esperantistiĝo. Vere forpasis multe da jaroj de kiam mi lernis la lingvon ĝis hodiaŭ, kaj renovigo de ideoj kaj modernigo de la formoj kiel prezenti aktualan revuon fariĝis postulo neekskuzebla de nia Hispana

Esperanto-Federacio...


Al la nova ĉefredaktoro ni deziras plenan sukceson kaj al nia revuo privilegian lokon inter la plej bonaj de la E-movado!! Ili devas alporti al ni novajn konceptojn pri la esperantismo, freŝajn vibrojn pri interkompreno kaj unueco, renovigon de nia idearo surbaze de homamo kaj liberaj principoj. Kiel revis niaj pioniroj. Kiel pensas la moderna homo...

Antaŭen, do, samideanoj kaj amikoj!

# 56a HK

Valencia 8a - 13a de Julio 1997

## DANKON, ANTONIO!



*Antonio VALEN*

Ok jaroj de konstanta kaj fervora laboro por esperanto kaj nia movado ja ne estas bagatelo. Antonio Marco ekredaktoris *Boletín* la numero 292-293 (septembro 1989) kaj pluis ĝuste la numero, kiun vi nun enmanigis

kaj legas, la 331an (majo-junio 1997). Nia redaktoro jam de longe -eĉ

de tre longe-esprimis sian deziron transdoni la revuon al alia homo, kondiĉe, ke tiu estas kompetenta. Finfine aperis tia homo preta transpreni la torĉon, kaj Marco povos nun dediĉi tempon kaj energion al aliaj projektoj, kompreneble plu rilataj al esperanto kaj Esperantujo. Mi deziras nun al Miguel Gutiérrez Adúriz (prestaŭ certa anstataŭanto), ke la servo al la hispana E-Movado kiel redaktoro de *Boletín* estu almenaŭ same frukto-dona, renoviga kaj impulsa kiel la longa periodo de Antonio Marco.

Antonio ja povus rakonti pri anekdotoj kaj peripetioj dum lia okjara deĵorado. Ve al redaktoroj de E-revuoj, ili ja meritas nian plenan kompate-mon!: artikoloj perdiĝas sur la poŝta vojaĝo, promesintoj ne verkas kontri-buajojn, kunlaboranto ne sendas artikolon ĝustatempe, alia plendaĉas pri du koma kopi-erareto, tria tondras kontraŭ ĉio kaj ĉiu... Nu, ankaŭ esperantis-toj estas tre home-

4  
caj homoj, ĉu ne? Multfoje li montris al mi liahejme plej strangajn leterojn el tuta stako da korespondaĵoj kun ĉia-specaj petoj, plen-doj, insistoj kaj eĉ malĝentilaj koleresprimoj. Kompense, de tempo al tempo alvenis ankaŭ unu-du leteroj kun kuraĝigaj vortoj...

Kia estis *Boletín* dum la lastaj ok jaroj? Kion celis Marco per sia redakto-rado? Ni citu el lia unua numero: «Mi pretendas prezenti al vi, karaj legantoj kaj amikoj, revuon freŝan, spirite larĝan kaj malfermitan al ĉiuj noblaj iniciatoj. Inter miaj celoj mi ne alkalkulas vesti nian gazeton pli brile, eble nur pli digne. Tamen mi aspiras plibonigi ĝin per interesaj artikoloj kaj bonaj novaĵoj, sed kompreneble, por atingi tion mi bezonas vian kunlabora-don» (“Revo kaj realo en mia saluto”), *Boletín*-292-293, 1989, p.4).

En la sama artikolo, li tamen ne povis ne mencii lian ŝatatan ĉevale-ton: «en mia menso de veterana esperantisto, iom utopia kaj idealisma, anko-raŭ vibras malnova revo pri aperigo de elstara beletra E-revuo por hispanoj, kun riĉa literatura enhavo kaj ĉarmaj allogaj anguloj...»

Nu, tiun revon li plenumis duone pere de *Boletín* kiu de tiam preskaŭ ĉiunumere enhavis ne nur movadajn kaj informajn artikolojn, sed ankaŭ originalajn aŭ tradukajn beletraĵojn. Kaj tiun ioman beletriĝon mi interpretas variigo de la revuo, diverseco por igi ĝin pli alloga, kio, dirite inter ni,

estis la konstanta zorgigo de nia redaktoro.

Mi elstarigu du aliajn artikolojn el tiu unua numero sub la redakto-reco de

Marco: informo pri la preuniversitataj kursoj en Santiago de Compos-tela dank’ al la iniciato de nia prezidanto Antonio Alonso kaj primovada artikolo de Bernard Golden. Bela koincido, ke post multaj preparoj, elpaŝoj kaj klopodoj, la preuniversitataj kursoj ŝajne komenciĝos ĉi-somere. La artikolon de Golden mi mencias, ĉar simple ne eblas bildigi al si *veran* E-revuon sen artikolo(j) de la plej inko-pisa esperantisto...

En la sekva numero (294), Marco pli decide fiksas la konturojn de sia projekto: «Ni penos aperigi ĝin (la revuon), minimume dumonate (...) Kaj kiel plej grava enhavo: artikoloj pri internaj problemoj, informado, paĝoj pri lingvistiko, esperanta literaturo, didaktiko, historio, sociologio, traduko de klasikuloj, ktp. Mi ankaŭ dezirus meti paĝon en esperanto pri poetoj kaj escistoj elstaraj de la pluraj iberiaj kulturoj. (...) Tion ni intencas fari iom post iom kaj ĉiam fidante je la kunlaborado de la plej kapablaj».

La legantoj devas juĝi, ĉu Marco sukcesis; laŭ mi, li plene atingis sian celaron kaj dum la lastaj ok jaroj *Boletín* klare plialtigis la antaŭan nivelon proponante ĉiam iom pli ol averaĝa nacia bul-teno. La kresko estis kvanta kaj kvalita, ĉar nun ĉiuj konsideras *Boletín* pli bona revuo ol antaŭ

ok jaroj. Kaj se pravigi mian personan bilancon dum tiu tempo oni ricevis en Zaragozo dekojn da diversaj E-revuo- pro interŝanĝo kun *Boletín*. Mia opinie, nur *Esperanto sub la Suda Kruco* (red. Donald Broadribb) nete superas *Boletín* en la kampo de la naciaj bul-tenoj.

En la lastaj 40 numeroj de nia revuo aperis kompreneble multegaj kongresraportoj, primovadaj artikoloj, omaĝoj kaj honoraj membriĝoj, strategiaj planoj kaj debatoj, estraraj informoj, oficialaj decidoj, ktp. Sed ankaŭ ne mankis beletraj artikoloj el la plumo de Marco pri hispanaj verkistoj, ekzemple Gerardo Diego, San Juan de la Cruz, Fray Luis de León, Francis-co de Quevedo, Lope de Vega, Pedro Calderón de la Barca...; se ne paroli pri amaseto da al-andalusaj aŭtoroj. Kaj ankaŭ originaloj de esperantaj aŭtoroj (Fernández, Kamaĉo, Montagut, Mora i Arana, Neves k.a.) kaj recenzoj de Marco mem, Fernández, Golden, Gumá, Hernández Llusera, Kamaĉo, López Escartin, Noguero, Uruetia...

Por verki la nunan artikolon, mi devis refoliumi la lastajn numerojn, kaj konstatis la jenan simplan veron: estis multaj bonaj momentoj. Ni travi-vis kun *Boletín* la entuziasman preparadon kaj postan sukceson de la UK en 1993, la samjaran akaparon de la iber-skolanoj en la Belartaj Konkursoj de UEA, la registaran deklaron de HEF "asocio kun publika utilo", la redakta-don de granda vortaro hispana-esperanta fare de Fernando de Diego (307, 316, 318, 321)...sed kompreneble, ne ĉio pozitiva. Ni ankaŭ sciigis pri la dolora falo de brila stel' niakultura: la 27an de januaro 1993 forpasis Juan Régulo Pérez, ne nur mentoro de tuta generacio kaj gravega E-eldonisto, sed ankaŭ bonega homo en la plej humana senco de l' vorto.

Sed ni reiru al la revuo mem: jam de la komenco, la kovrilo ŝanĝiĝis kaj poste, la numero 303 signis novan kompos-

tadon multe pli allogan kaj modernan, plene faritan per komputilo. Same n-ro 319 ricevis ankoraŭ novan kovrilon kaj 10-paĝan kreskon. *Boletín* rimarkinde antaŭeniris per gigantaj paĝoj kaj montriĝis pli kaj pli alloga. Nu, se mi devus selekti artikolojn el la lastaj 40 numeroj, mi volonte elektus la leterojn de Kamaĉo al Waringhien (306) kaj al Régulo (310), aŭ la escon "Novaj spuroj en Hispanio" de Neves (307-308)...aŭ eble nekrologon (Diri vian nomon, Ada Fighiera-Sikorska, 328), artikolon (Mi estis en Gdansko, 322) aŭ ajnan poemon de Fernández (300, 310, 319); kaj ankoraŭ artikolon (Vampiretoj kaj parazitaj, 318) kaj tradukon (En la sama rivero, 311) de de Diego...aŭ —kial ne?— kelkajn el la ne ĉiam afablaj, sed nepre instruaj artikoloj de Golden (preskaŭ ĉiunumere). Kaj —mi ne forgesu— ankaŭ la kor-elverŝajn pensojn de Gumá okaze de la 300 numero de *Boletín*. Se vi havas la kolekton ĉemane, ne hezitu relegi por trovi mem ion interesan.

Dum tiuj ok jaroj, Marco ne nur redaktis ĉi revuon, sed ankaŭ la HALE-organon *Kajeroj el la Sudo* — kaj li trovis tempon eĉ por publikigi diversajn librojn: *60 años de Esperanto en Callosa* (1992), *Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo* (duvoluma, 1992 kaj 1993) kaj same du eldonojn de la *araba-hispana antologio* Lirikaĵoj de Al-Andalus (1995 kaj 1996). La tri verkoj ĉie rikoltis ŝaton, pozitivajn recenzojn kaj —ne malpli grave— ankaŭ modere bonan disvendon. Ci-jare ni vidis la libro-forman apearon ĉe SAT de *Laboristaj Kronikoj* alia historia studo, en kiu ni scias pri personaj trajtoj de kelkaj

elstaruloj niamovadaj, sed ankaŭ -plej emocie- pri la revoj kaj aspiroj de Marco mem dum ekziliĝo en Alĝerio post la hispana frat-milito... Sajne ankaŭ *Laboristaj Kronikoj* estas plene bon-aŭgura. Nu,

almenaŭ same bon-aŭgura, kiel mia nuna dezir-esprimo al amiko Antonio Marco por la venontaj jaroj: mi kore esperas, ke li sukcesos plu labori kaj frukti ĝuste nun, kiam li ekdisponos pli da libera tempo.

Dankon, Antonio, pro tiuj ok jaroj da *Boletín*



## JARRAPORTO DE LA HEF-ESTRARO EN 1996

— *Eldonaĵoj.*

Krom nia organo *Boletín*, plue ĉefredaktata de Antonio Marco, en-das menciit kelkajn verkojn aperintajn dum la lasta jaro, en kiuj iel aŭ alie la Federacio intervenis.

— Plej grava por la propagando de la internacia lingvo estis la disko “Esperanto”, de la eldonejo Warner Music Spain. Laŭ peto de la produktisto, Marcos Cruz kaj aliaj helpadis pri lingva korektado de la tekstoj, kaj aliaj organizaj taskoj (vidu *Boletín-329*). Nur bedaŭratas ke la monsumo ofertita al la asocio ne alvenis.

— La Universitato de Santiago de Compostela eldonis libron “Sur la spuroj de Federico Garcia Lorca”, de Miguel Fernández, kiel la unua el la kajeroj uzotaj en la preuniversitataj kursoj. La Federacio ne partoprenas finance, ta-

men estas ja nia prezidanto kiu animas tiun projekton.

— Laŭ peto de la Eŭropa Klubo (Paderborn) la Federacio kunlaboris en la redaktado de la Eŭropa Kalendaro 1997/1998, kun ĝeneralaj informoj pri Hispanio kaj traduko de vortlisto en la hispanan (vidu *Boletín-327*).

— Ĝuste dum oni skribas tiun ĉi raporton (majo 1997), estas presata hispanlingva 80-paĝa broŝuro. Ĝi estas altkvalita informilo pri la internacia lingvoproblemo, kiun ni distribuos unue al ĉiuj HEF-anoj, sekve al ĉiuj hispanaj ministroj, hispanaj eŭroparlamentanoj, politikaj partioj, priedukaj instancoj fe la Aŭtonomaj Komunumoj, universitatoj, presagentejoj kaj ĵurnaloj. Temas pri tre vasta kaj grava inform-kampanjo.

— *Libro-Servo:* plian jaron Luis Hernández prizorgis la disvendadon de libroj kaj aliaj varoj nome de HEF, kun

eldono de ampleksa katalogo. (Sekvas ampleksa detalo pri tiu Servo).

— *Kursoj*: En la centra oficejo okazis Cseh-kurso komence de 1996. De tiam oni planadis kaj preparadis perkorrespondadan kurson, kiu fine ekfunkciis en marto 1997. Ĝi estas profesiese aranĝita, iel laŭ la komerca stilo, kaj ni amplekse propagandis ĝin. Revizias la ekzercojn Fernando Moral. Ni multe esperas de tiu ĉi kurso.

— *Librotenado*: Niaj membroj Pedro Garrote (loĝanta nun en Valladolid) kaj Maritza Graciani (Madrid) prilaboris la financon librotenadon de la jaro 1996a, laŭ la oficiala "Plan General Contable". Tio donas dudekpaĝan dokumenton, kiun laŭleĝe ni devas prezenti al la Registaro (Ministerio pri Internaj Aferoj).

— *Servoj al la junaj HEF-membroj*: La junaj membroj de la Federacio ricevas ĉiun duan monaton ne unu sed tri revuojn: «Boletín», «Kontakto» (de TEJO) kaj «Koncize» (de Eŭropa Junularo, Koln).

Daŭre la Centra Oficejo de HEF estas la peranto de UEA kaj de la revuo «Eventoj» por Hispanio.

— *Konekto al Internet*: Jam komence de 1996 la C.O. ekuzadis la reton por facile sendi kaj ricevi komunikojn. Krome, en novembro ekstartis la alia reta projekto: la paĝaro. Ĝi estas ampleksa informilo kelklingva pri ĉio rilata al esperanto, aranĝita de Miguel A. Sancho kaj Marcos Cruz nome de HEF, konsultbla de ĉiu uzanto disponanta ret-konekton (vidu Boletín-329).

56a

## HEF-Kongreso

Alvoko al

Ĝenerala Kunveno de HEF

Konforme al nia Statuto, la HEF-prezidanto kunvokas ĉiujn membrojn al la Ordinara Ĝenerala Kunveno okazonta en Valencio la 11an de julio de 1997, kadre de la 56a Hispana Esperanto-Kongreso.

### TAGORDO

1.- Lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno.

2.- Prezento kaj eventuala aprobo de la kontoj de HEF kaj de la Libro-Servo.

3.- Prezento kaj eventuala aprobo de la jar-aporto de la HEF-estraro.

4.- Kotizoj por 1998.

5.- Elekto de nova HEF-estraro post fino de la kvarjara mandato. (Prezentu proponojn kaj sin proponojn de kandidatoj al la Sekretario ĝis la komenciĝo de la asembleo.)

6.- Aljuĝo de la premio "Klara Silbernik".

7.- Demandoj, petoj, proponoj.

HEF-Estraro



## JARRAPORTO PRI LA AGADO DE LIBRO-SERVO

Kiel komplemento al la Konto-etato de enspezoj kaj elspezoj de la pasinta jaro, mi, kiel prizorganto de Libro-Servo de HEF deziras prezenti al via konsidero la jenan raporton:

Dum la pasinta jaro, oni vendis librojn kaj aliajn varojn (emblemojn, kasedojn ktp.) kies valoro estis malpli ol unu miliono da pesetoj, pro la fakto ke ni ne ricevis la monon de la libroj kaj esperantaĵoj venditaj dum la Hispana E-Kongreso okazinta en Murcio, malgraŭ la diversaj alvokoj faritaj letere kaj telefone. Kiel dum pasintaj jaroj, la plej granda parto estis vendita per poŝto. En la komenco de la nuna jaro 1997, ni ricevis la monon de la libroj kaj esperantaĵoj venditaj dum la Hispana Kongreso de Esperanto en Murcio, konsekvence tiu kvanto eniros en la kontoj en 1997.

Kiel dirite, Libro-Servo sendis librojn kaj alian materialon al la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Murcio, kaj pri la rezulto atingita mi informos venontjare.

Pli ol cent pakajoj estis senditaj dum la jaro, kaj el ili nur du aŭ tri estis resenditaj al ni, pro diversaj kaŭzoj, inter ili pro nepreno de la pakajo en la Poŝtoŝicejo. Kun la celo instigi la aĉetadon de libroj, oni faris diversajn ofertojn.

Por regule informi siajn klientojn kaj amikojn, Libro-Servo de HEF eldonis trifojne dudekok aŭ tridekdu paĝan Katalogon, enhavantan, krom la kutimaj informoj pri libroj kaj aliaj varoj, detaloj pri diversaj esperantistaj eventoj, precipe tiuj okazintaj en Hispanio. Aldonaj folioj kun

la titoloj ricevitaj inter la apero de unu kaj alia Katalogo, kun la koncernaj komentoj pri tiuj verkoj, estis senditaj kun la mendo al ĉiu mendinto.

Kiel jam okazis pasintjare kiel servo al la klientoj de Libro-Servo oni akceptis la pagojn al diversaj esperantlingvaj revuoj kaj internaciaj Esperantaj Asocioj kaj ni intencas ripeti similan servon en venontaj jaroj. Mi esperas kaj deziras ke tiu servo estu kontentiga por niaj klientoj kaj eĉ por la perantoj de la diversaj revuoj kaj Asocioj.

Kiel mi jam diris en aliaj okazoj, la stoko da libroj kaj aliaj varoj, estas, rondenŝifere, unu miliono da pesetoj, sed mi devas averti ke tio signifas nenion, ĉar la plej granda parto el la libroj en stoko, kies kvanto estas tro granda, malrapide kaj tro malfacile, estas vendataj.

Kun la celo ampleksigi la nombron da titoloj kaj malpliigi la stokon da libroj eldonitaj en Hispanio, ni proponis al diversaj Libro-Servoj el la mondo, la interŝanĝon de libroj, kiu estis akceptita nur de malalta nombro el ili.

Konsiderante ke la libroj devas esti montrataj en normalaj librovendejoj kaj ĉar ekzistas en nia urbo Libro-vendejo specife dediĉata al la vendado de libroj por studado de fremdaj lingvoj, ni lasis tie kelkajn titolojn en deponejo, sed la rezulto ne estis tiel kontentiga kiel ni deziris.

Por la nuna jaro la Libro-Servo de HEF daŭrigos sian laboron je la servo de la klientoj kaj de ĉiuj esperantistoj kiuj mendos librojn al ni.


Dankante pro via komprenemo kaj *pozitivaj* rimarkoj kaj kritikoj, restas je via dispono

Luis HERNÁNDEZ GARCIA  
Libroservanto de HEF

Jen la nova Estraro de HEF



Desegnu la vizaĝojn  
voĉdonu en Valencio



LIBROSERVO

983-260086

telefona aŭtomata respondilo

9

## KONTO-ETATO DE HEF-LIBRO-SERVO 1996

### Enspezoj

Antaŭa Saldo .....	33.069
Vendado de libroj .....	945.898
Interesoj konto Poŝta Kaso .....	43
Diversaj abonoj dum 1996 .....	29.400
Aliaj .....	3.200
<b>JARENSPEZOJ .....</b>	<b>978.541</b>
<b>ENTUTE .....</b>	<b>1.011.610</b>

### Elspezoj

Aĉetado de libroj .....	743.152
Materialo por oficejo .....	73.652
Poŝto (poŝtmarkoj, O.I.C.) .....	85.275
Transporto de libroj .....	24.866
Bankaj elspezoj .....	7.843
Telefono .....	3.681
Diversaj abonoj .....	25.800
Aliaj .....	2.212
<b>JARELSPEZOJ .....</b>	<b>966.481</b>
Konto-Etato de HEF dum 1996 .....	45.129
Saldo al nova konto .....	1.011.610

Valladolid 31 de decembro 1996

# Hispana Esperanto-Federacio.

## Balance de Situación.

PASIVO	Ejercicio 1996	Ejercicio 1995
A) Fondos propios .....	13.225.127.....	13.643.942
I. Capital Suscrito .....	13.623.803.....	13.623.803
VI. Pérdidas/Ganancias (Benef./Pérd.).....	-398.676.....	20.139
E) Acreedores a Corto Plazo.....	410.466.....	78.550
IV. Acreedores Comerciales .....	299.746.....	57.950
2. Deudas por compras o prestaciones .....	299.746.....	57.950
V. Otras deudas comerciales no comerc.		
1. Administraciones Públicas		
VII. Ajustes por periodificación.....	110.720.....	20.600
<b>TOTAL GENERAL (A+B+C+D+E) .....</b>	<b>13.635.593.....</b>	<b>13.722.492</b>

ACTIVO	Ejercicio 96	Ejercicio 95
B) INMOVILIZADO .....	10.816.937.....	10.588.025
III. Inmovilizaciones materiales .....	10.816.937.....	10.588.025
1. Terrenos y construcciones.....	10.000.000.....	10.000.000
2. Instalaciones técn. y maqu .....	425.778.....	280.000
3. Otras instalaciones,ut.y mobÜ.....	183.134.....	100.000
5. Otro inmovilizado .....	208.025.....	208.025
D) Activo circulante .....	2.838.795.....	3.134.467
II. Existencias .....	120.290.....	44.112
1. Comerciales.....	120.290.....	44.112
III. Deudores .....	147.390.....	383.500
1. Clientes por ventas y servicios		
4. Deudores varios .....	147.390.....	187.000
VI. Tesoreria .....	2.563.889.....	2.706.855
VII. Ajustes por periodificación .....	7.226	
<b>TOTAL GENERAL (A+B+C+D) .....</b>	<b>13.655.732.....</b>	<b>13.722.492</b>

Sciŭ pri ni en... <http://www.home.adv.es/esperanto>

B) INGRESOS .....	1.053.337	842.250
1. Importe neto de cifra negocios .....	1.003.429	774.624
a) Ventas (*) .....	1.003.429	774.624
4. Otros ingresos de explotación .....	44.605	4.223
a) Ingresos accesorios y otros .....	10.430	
b) Subvenciones .....	34.175	4.223
I. Pérdidas de explotación .....	384.582	27.683
(A1+A2+A3+A4+A5+A6+B1-B2-B3-B4)		
5. Ingresos participac. en capital .....	2.803	1.533
a) En empresas del grupo .....	2.803	1.533
II. Resultados financieros negativos (A7+AB+A9+B5+B6+B7+B8)		
III. Pérdidas activid. ordinarias .....	381.779	27.275
(B1+BII-AI-AII)		
12. Ingresos extraordinarios .....	2.500	61.870
IV. Resultados extras negativos .....	1.500	
(A10+A11+A12+A13+A14-B9-B10-B11-B12-B13)		
V. Pérdidas antes de Impuestos .....	380.476	
(BIII+BIV-AIII-AIV)		
VI. Resultado Ejercicio (Pérdidas) .....	395.873	
(BV+A15+A16)		

(\*) Detalle del concepto B) 1. a) "VENTAS":

Ingresos cuotas socios .....	874.750
Ventas de libros .....	76.732
Ingresos por cursos .....	28.200

## DEBE

Ejercicio 96

Ejercicio 95

A) GASTOS .....	1.452.013	822.111
2. Aprovisionamientos .....	510.301	281.505
a) Consumo de mercaderías (*) .....	510.301	281.505
3. Gastos de personal .....	26.496	50.338
b) Cargas sociales .....	26.496	50.338
6. Otros gastos explotación .....	895.819	474.687
a) Servicios exteriores (*) .....	895.819	474.687

Kontaktu nin per... [esperanto@adv.es](mailto:esperanto@adv.es)

I. Beneficios de explotación (B1+B2+B3+B4-A1-A2-A3-A4-A5-A6)		
7. Gastos financieros y asimilados	1.125	
a) Deudas con empresas del grupo	1.125	
II. Resultados financieros positivos. (B5+B6+B7+B8-A7-A8-A9)	2.803	408
III. Beneficios actividades ordinarias (A1+AII-B1-BII)	2.803	408
11. Pérdidas procedentes inmovilizado	4.000	25
IV. Resultados extraordinarios positivos. (B9+B10+B11+B12+B13-A10-A11-A12-A13-A14)		61.485
V. Beneficios antes de impuestos (AIII+AIV-BIII-BIV)		34.978
15. Impuesto sobre sociedades	15.397	14.431
VI. Resultado del Ejercicio (Beneficios)		20.547

(\* Detalle del concepto A) 2.a) "Consumo de Mercaderías"


—Armario Biblioteca	175.000
—Compra de libros	125.297

(\* Detalle del concepto A) 6.a) "Servicios exteriores"

—Edición de Boletín	286.038
—Diseño logotipo	125.000
—Cuota de UEA	73.752

## Perkoresponda Kurso

Li estas  
tiel alta  
kiel mi



**Lernolibro:** Esperanto, curso del idioma internacional; **ekzercaro** (presitaj aŭ en diskedo); **informlibro:** El Esperanto: fenómeno de la comunicación; **vortaro** Lexicón Sopena; **kasedo** kaj la gvido de kompetenta **instruisto** jen telefone, jen fakse, jen per normala aŭ elektronika poŝto.

**nur 14.900 ptojn\***

Ĉiu kursano ricevos senpage dum unu jaro la koncernajn publikigadojn de la Asocio: Boletín, Juna Amiko, Koncize kaj Kontakto.

Mendu ĝin ĉe HEF, Rodríguez San Pedro 13-3-7a, ES-28015 Madrid.  
Tel+Faksilo: 34(9)1-4468079; [esperanto@adv.es](mailto:esperanto@adv.es)

\* Remburse plus sendokostoj. Gejunuloj kun "Carnet Joven" ricevas 10 elcentan rabaton.

# Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto

13

La Universitato de Santiago de Compostela (USC) kaj Hispana Esperanta-Federacio (HEF) invitas tutmondajn studentojn al la unuaj Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto (K+E).

La kursoj okazos en la USC. La lernantoj alvenos la 16an de julio matene, kaj foriros la 26an de junio matene.

## La temaro konsistas el:

- 1.— Studo pri la hispana poeto Fererico García Lorca, kaj pri la hispana asonanco en la esperanta poetiko.
- 2.— Enkonduko en la Eŭropa Juro.
- 3.— Elementa Astronomio.

## Laŭdetala kosto de la kurso en pesetoj:

a.— aliĝo kaj administrado .....	5.000
b.— tranoktado en dulita ĉambro kun bano 2.000 x 10 noktoj .	20.000
c.— tri manĝoj tage 1.500 x 10 .....	15000
d.— lernmaterialo (3 libroj + kasedo) .....	5.000
e.— medicina asekurkontrakto .....	2.000
f.— kromaj aktivajoj .....	5.000
Entute .....	52.000

Bonvolu aliĝi kiel eble plej frue. Por aliĝi oni devas pagi 52.000 pesetojn, pere de bank-ĉeko, banka transpago aŭ postmandato, al Caixa Galicia, Santiago de Compostela, c/c 2091 0388 9831 1000 0977. Samtempe oni sendu al "Cursos Internacionales en Esperanto, Facultad de Ciencias Políticas, ES-15706 Santiago de Compostela, Hispanio" fotokopion de la pag-atestilo kune kun kompleta nomo, sekso, aĝo, adreso, telefono, ktp., de la aliĝanto. Oni klarigu ankaŭ ĉu oni petas aliĝon kiel studento aŭ observanto.

Aktivajoj "b", "c" kaj la instruado okazos en lokoj tre proksimaj inter si. Limdato por aliĝo: 1a de julio



# La Reĝino kun ni

La Reĝino de Hispanio, Sofia, akceptis la Honoran Prezidantecon de la *7a Internacia Esperanto-Kongreso*, kiu okazos en Valencia, inter la 8a kaj la 13a de julio 1997.

Tio signifas morala oficiala apogo de la Hispana Reĝa Familio al nia movado, kaj agnosko de la streboj de la esperantistaro por atingi pli pacan kaj fratecan mondon.

7a Internacia Esperanto-Kongreso  
7a Eŭropa Esperanto-Forumo  
5a Hispana Esperanto-Kongreso

## PROGRAMO

Lundo, 7a de julio

10,00 ĝis 15,00 kaj 15,00 ĝis 19,00 h. Disdono de la kongresa dokumentaro.

11,00h. Malfermo de Libro-Servo

11,00h. Malfermo de Filatela Ekspozicio.

11,30h. Estrar-kunveno de Hispana Esperanto-Federacio.

12,30h. Gazetara Konferenco.

14,00h. Manĝo-paŭzo.

16,00h. Kurso de Esperanto laŭ Cseh-metodo

17,00h. Estrar-kunveno de "Monda Turismo"

17,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo. 1a prelego (\*)

18,30h. Interkona Vepero.

21,00h. Arta Vespero (\*\*)

Merkredo 9a de Julio

09,00h. Malfermo de Libro-Servo

10,00h. Solena Inaŭguro de la Kongreso.

12,00h. Cseh-Kurso.

12,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo, 2a Prelego (\*).

13,30h. Akcepto de delegitoj kaj reprezentantoj ĉe Urbo-domo.

14,00h. Manĝo-paŭzo.

16,00h. Publika kunsido de akademianoj de Esperanto.

17,30h. Filmo en Esperanto.

17,30h. Kuveno de la partoprenantoj en la pilgrimado al Santiago de Compostela kaj al la Postkongresoj.

19,00h. Ronda Tablo de la Eŭropa Esperanto-Forumo.

21,00h. Teatro en Esperanto

Ĵaŭdo 10a de Julio

09,00h. Eliro de la dumkongresaj ckskursoj

09,00h. Malfermo de Libro-Servo

10,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo, 3a prelego (\*).

12,00h. Cseh-Kurso.

14,00h. Manĝo-paŭzo

16,00h. Publika kunveno de membroj de AIS.

17,00h. Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio.

17,00h. Urba perpieda trarigardado

19,00h. Internacia Arta Vespero, 1 (\*\*).

22,00h. Nokta perpieda rigardado de la urbo.

Vendredo 11a de Julio

09,00h. Eliro de la dumkongresaj ekskursoj.

09,00h. Malfermo de la Libro-Servo.

10,00h. Cseh-Kurso.

10,00h. Internaciaj Ekzamenoj de Esperanto.

12,00h. Prelego pri Esperanto por ne-esperantistoj.

14,00h. Manĝo-paŭzo.

16,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo, 4a prelego (\*)

17,30h. Prezento de novaj libroj.

17,30h. Kunveno de "Monda Turismo".

19,00h. Internacia Arta Festivalo, 2 (\*\*).

21,00h. Kongresa Vespermanĝo.

Sabato 12a de Julio

09,00h. Eliro de la dumkongresaj ekskursoj.

09,00h. Malfermo de la Libro-Servo.

09,30h. Prezento venontaj E-kongresoj (inter ili UK-oj de Adalaido kaj Montpellier)

09,00h. Cseh-Kurso.

10,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo. 5a prelego (\*)

12,00h. Literatura grupo "Ibere Libere". Speciala programero.

14,00h. Manĝo-paŭzo.

16,00h. Eŭropa Esperanto-Forumo, 6a prelego (\*)

18,00h. Solena Fermo de la Kongreso.

18,00h. Fermo de la Filatela Ekspozicio.

20,00h. Hispana Arta Vespero (\*\*).

Dimanĉo 13a de julio

09,00h. Eliro de la dumkongresaj ekskursoj

10,00h. Ferma prelego. Omaĝoj (\*).


12,00h. Granda Internacia Arta Festivalo (\*\*).

14,30h. Komuna Adiaŭa Tagmanĝo.

17,00h. Adiaŭo.

Lundo 14a de julio

09,00 Eliro de la Postkongresaj ekskursoj kaj de la Pilgrimado.



### (\*) PRELEGOJ:

1.- Miguel Fernández (Hispanio): «Sur la spuroj de Federico Garcia Lorca».

2.- Gian Carlo Fighiera (Italio): «Esperanto preter la jaro 2000».

3.- Anton Zacharias (Slovakio): «Instruado de Esperanto laŭ ĉseh-metodo».

4.- Andreo Grebowski (Pollando): «Internacia E-Turismo», kun kolokvo.

5.- Rafaela Urueña (Hispanio): «Unueca Eŭropo: Juro en la nova Eŭropo».



6.-Milan Zvara (Slovakio): «Mikologio kaj fungokolektado en Centra Eŭropo»

7.- Antonio Alonso (Hispanio) gvidos: «Debato pri la lingvoj de Hispanio»-n.

8.- Barbara Petrzak, redaktoro de Pola Radio (Pollando) «Esperanto en Radio».

Sen konfirmo ankoraŭ:

9.- Miguel Angel Sancho (Hispanio): «Metodologio de Multimedia Informatiko»

10.- Ursula Tupajka (Pollando): «Programo pri Adam Mickiewicz, omaĝe al Ada Fighiera-Sikorska.

11.- Jesus de las Heras (Hispanio): «La muziko de Fernando Sor», kun gitaro.

12.- Augusto Casquero (Hispanio): «Pilgrimado tra la vojo de Sankta Jakobo».

(\*) Eventuala ŝanĝo de prelego estos sufiĉe antaŭtempe anoncita (tago kaj horo) sur la anoncotabulo de la Kongresejo.

## ARTA KAJ KULTURA PROGRAMO:

1.- Muzik-ensemblo «ANDA» (Pollando) 3 personoj kun propraj instrumentoj. Ili ludos dancmuzikon por Interkona Vespero kaj aliaj momentoj de la kongresoj

2.- «Koruso de malnova Kanto de Pedagogia Altlernejo de Bydgoszcz (Pollando). Ĉirkaŭ 40 personoj!

3.- Ensemblo «Plomienie» (Flamo) Infana folkloro dancgrupo, 40 infanoj

kun belegaj tipaj vestaĵoj de la Palaco de la Junularo de Bydgoszcz (Polio)

4.- Folklor-ensemblo «Paluki» el Rogowo (Pollando) 6 personoj.

5.- Infana teatra grupo el Szubin (Pollando) 9 personoj. Spektaklo "Eta Princo"

6.- Junulara muzik-kantgrupo el Vojevodia Kultur-Centro de Bydgoszcz (Pollando). Muziko de la 60-aj jaroj.

7.- Recitalo de Jadwiga Dziegielewska kun piana akompananto (Pollando)

8.- Arta programo de Ursula Tupajka «Versaĵoj de Julian Tuwin por infanoj» (playback) Pollando.

9.- Muzik-grupo "Zagraba", 6 personoj, el urbo Nikolajev (Ukrainio). Elstaras la infankantistino Irina, 5-jara, kiu mirinde kantas en Esperanto.

10.- Folkloro muzik-ensemblo «Animo». (Latvio).

11.- Muzik-grupo, el Rumanio.

(\*\*) Ankoraŭ ne konfirmitaj:

12.- Muzik-grupo, el Bulgario.

13.- La famaj artistoj Michael Bronstein kaj S-ino Puchova (Rusio)

14.- Eduardo Vargas (Solo) (Hispanio)


15.- Teatro de la ensemblo de Angelina Soritova (Bulgario)

16.- Pop-grupo ASORTI (Litvio).

Grava klarigo: Prelegoj, debatoj, koncertoj, teatro kaj ĝenerale ĉiu programero okazos nur en Esperanto.

Jam konfirmis sian partoprenon ĉ. 500 gekongresontoj el 16 landoj.

La O.K.K.



Hispanlingva libreto "Pro Esperanto" [= (Plede) por Esperanto], redaktita de Antonio Alonso Núñez, kaj ĵus eldonita de Hispana Esperanto-Federacio. 80 paĝoj laŭ grando A5 (14'8 cm × 21 cm), kun 132 ilustraĵoj. Eldonkvanto, 5.000 ekzempleroj. Prezo, 200 pesetoj.

Densa informo pri:

— La problemo de la internacia lingva komunikado.

— La starpunkto de la uzantoj kaj pledantoj de Esperanto rilate tiun problemon.

— Opinioj kaj argumentoj por kaj kontraŭ Esperanto.

— La funkciado kaj vivo de Esperanto.

Kopio, traduko aŭ adaptato tuta aŭ parta estas permesataj, ja prefere per interkonsento kun HEF. Ĉiukaze, cito pri la fonto kaj alsendo de unu ekzemplero estos dankata.

HEF volonte disponigos al eventualaj tradukontoj la komputil-disketojn kun la ilustraĵoj (el kiuj 100 estas rekte uzeblaj sendepende de la koncerna lingvo, kaj la ceteraj pli-malpli facile adapteblaj el la hispana lingvo).

Tiu densa informo estas jam senpage distribuita fare de HEF al ĉiuj HEFanoj individuaj kaj kolektivaj, ankaŭ al la

hispanlingvaj Landaj Asocioj de UEA, kaj al diversaj institucioj kaj aŭtoritatoj de la hispana ŝtato. La federacioj aŭ ĉefaj grupoj de la hispanaj Aŭtonomaj Komunumoj, siavice, faris analogan distribuon al institucioj kaj aŭtoritatoj de la respektivaj teritorioj.


Fine, HEF planas ankaŭ publikan vendadon de la libreto pere de surstrataj ĵurnalbudoj. Se tio montriĝos necbla aŭ nesukcesa, do ĉiu HEFano estos petata aĉeti mem almenaŭ kvin ekzemplerojn, kaj klopodi ilin vendi aŭ donaci al konatoj, bibliotekoj, ks.

Se ni bezonos sekvi tiun ĉi alternativon, do estus bone por ŝpari sendokojn, ke niaj anoj aĉetu la ekzemplerojn en Valencio okaze de nia tuja kongreso aŭ, se oni ne povos ĉeesti mem la kongreson, do komisiu al amiko kongresano aĉeton de ili: *Por la pli bona organizado de tiu eventuala kongresa disvendado estos utile, ke jam nun tuj ĉiu deziranto*

*aĉeti (rektae aŭ komisiite), informu la Centran Oficejon pri la dezirata kvanto.* (Kompreneble, tiu antaŭa informo neniel estos konsiderata firma mendo, sed ja nur informo pri intenco. Kaj se ni intertempe sukcesos pri vendado per budoj, do tia informo simple nuligeblas mem).

Helpu por la sukcesa distribuado kaj diskonigado de tia grava, rigora kaj altnivela informilo pri niaj agado kaj atingoj kadre de la ĉiam pli prema, komplika kaj maljusta problemo de la internacia lingva komunikado!!!





## Viglas la movado

**HEF bonaj servoj**

# 50



**En 1997**

**HEF bonaj servoj**

## La kongreso en Benidorm

Kiel anoncite, la 19an kaj 20an de aprilo okazis en Benidorm (Alicante) la 8an kongreson de Valencia E-Federacio kaj Murcio.

Laŭprograme, sabaton matene oni liveris la dokumentojn kaj, post la recipokaj agrablaj salutoj de la gekongresanoj, komenciĝis la kunveno de delegitoj de la diversaj E-Grupoj, en kiu oni debatis pri la plej gravaj problemoj de VEF. Tagmeze komuna tagmanĝo kaj ripozo paŭzo.

Posttagmeze Inaŭguro de la kongreso konsistanta el paroladeto de la VEF-prezidanto kaj salutoj de la delegitoj de la E-Grupoj. La Festparoladon faris la ĉefredaktoro de *Boletín*, Antonio Marco Botella, kiu prelegis pri “La poeto de la intimismaj kolokvoj”, en kiu la preleganto sentive komentis la plej gravajn viverojn de la poeto Antonio Machado Ruiz, kaj paralele al ĉiu vivero li recitis liajn plej interesajn poemojn. La ĉeestantaro kun evidenta emocio fervore aplaudis la preleganton. Tuj sekve, ankoraŭ sub la lirika etoso de la prelego, kelkaj el la ĉeestantoj starigis ne malpli ol duonhoran scivoleman kolokvon kun la preleganto pri la vivo kaj poezio de Antonio Machado.

Dimanĉon matene, post apudmara agrabla promenado kaj kolektiva foto de la kongresanaro, okazis la Ĝenerala Asembleo de V.E.F., en kiu oni debatis

la plej interesajn projektojn de la Federacio. Fine oni elektis novan estraron, kiun prezidos Juan Antonio Cabezos, el Murcio.

La Oficiala Bankedo taŭgis kiel Fermo de la kongreso, kiu malvolviĝis en tute agrabla etoso, kaj la adiaŭo ĝis Kasteljono, la venontjara kongreso, estis pli ol promeso pri la venonta renkontiĝo.

J. Miguel Bernabeu

## Fine de longa proceso

La sekretario de *Fundación Esperanto* informas al nia membraro, ke post longa komplika proceso (pli ol 20 jaroj), la Urbeŝtaro de Barcelono, fine, pagis la 20an de pasinta aprilo al nia institucio, la sumon rezutantanta de la tiel nomita «heredaĵo Casanovas-Ferrandis». La totala sumo atingis 3.719.333 Ptojn, sed nun ni devas pagi la kostojn de la unuaj perditaj pledoj kaj la honorariojn de la advokatoj kiuj oficis en la procesoj.

Ni profitas la okazon por informi al nia anaro, ke en neniuj momento antaŭ ol la indikita dato (20an aprilo 1997) «Fundación Esperanto» ricevis eĉ ne unu peseton de tiu heredaĵo, kaj la informoj aperintaj en esperantista gazeto tiusen- ce, estis simpla fuŝo de la informanto.

Sekretario de Funfacion Esperanto

## Kataluna Kongreso en Figueras


En Figueras, de la 1a ĝis la 4a de majo, okazis la 28a Kataluna E-Kongreso, kaj multenombraj da geesperantistoj partoprenis en la interesa programo organizita tiu asocio. La Urbestro de la urbo malfermis la eventon kaj Arturo Segura propagandis Esperanton per la loka T.V.; Dolores Masferrer komentis la katalunan tradukon de la instrua E-libro «Metodo de Pedro Nuez». La Kongreso bone sukcesis.

Carmen Llapart.

## 26a I.R.E.N.

La 26a Internacia Renkonto Natura- mika okazos de la 15a ĝis la 21a de aŭgusto 1997. La aranĝo post kvin-jara paŭzo denove atendas la aliĝantojn el hungarlanda, vilaĝa ripozloko Abaliget, situanta en la montaro Mecsek (Meček), 18 km-ojn for de la dumiljara urbo Pecs. La partoprenantoj loĝos en malgranda, arbara kampadejo.

Pli detalajn informojn vi povas ricevi aŭ letere, aŭ telefone: 36-72-333123 de S-ino Mathe. Koresponda adreso: Esperanto Asocio; H-7601 Pecs, pf 98. Hungario.



## Aŭtuna TEJO/Ker-seminario

La aŭtuna TEJO-KER-seminario, kun la temo "Edukado al paco" okazos de la 4a ĝis la 11a de oktobro 1997 en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

## 35 E-gazetoj en la reto!

Meze de marto la listo de Esperanto-gazetoj konsulteblaj en la Tut-Tera Teksaĵo (TTT), kreskis al 35, danke al la apero de "Ĉizilo", farata ĉe la universitato de Kostariko. Plena listo de gazetoj aperas ĉe Virtuala Esperanto-Biblioteko (VEB):

<http://www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html>

## EspeRom

La disko "espeRom" estas kolektaĵo de plej diversaj E-materialoj, programoj, tekstoj, sonoj, filmoj kaj legajoj! Ĝi estas farita per HTML-tekniko (tiu de la

interreto por TTT-paĝoj), do iu ajn povas uzi ĝin sen aparta scio pri komputilaj aferoj. La kompakt-disko ebligas ne nur legi diversajn tekstojn, sed ankaŭ vidi moviĝantan filmon pri E-arangoj, aŭskulti muzikon de E-kantistoj, aŭskulti fragmentojn el la E-lingvaj radioelsendo... Do vere utila materialo.

Por plene eluzi ĉiujn eblojn de la disko, estas necese havi komputilon PC 486DX66 kun min. 4 MB memoro, 12 MB libera loko sur la durdisko, sonkarto (SoundBlaster-kongrua), CD-ROM-legilo (min. duobla rapido) kaj VGA-monitoro.

Aktualaj novaĵoj pri espeRom troveblas ĉe:

<http://machno.hbi-stuttgart.de/~sf/esperom/>

## E-Reklamado al Senlaboruloj

«Esperanto ne helpas min akiri laboron!» Aŭ...«ĝi ne helpas min en mia laboro (se iam mi havas laboron!)». Tiaj estas la malvarm-duŝaj komentoj de finnaj senlaboruloj, kiam ili ekscias ke oni instruas Esperanton ĉe Helsinkiaj Senlaboruloj. Venontan aŭtunon mi metos serion de reklamoj sur la anonctabulon por montri al ili, ke Esperanto utilas ankaŭ en la laborvivo. Do, ĉu vi povas respondi la sekvajn demandojn?:

Ĉu Esperanto iam helpis vin en via laboro? Kaj kiel?. Ĉu ĝi ebligis al vi trovi laboron? (Via respondo povas helpi)

Bonvolu respondi Esperante aŭ his-

pane al: R.J. Milton, Kulosaaren Puisto-  
tie 38-1. FIN-00570 Helsinki. Finnlan-  
do.

## E-babilado en Reus

La pasintan 16an de marto okazis la monata E-babilado, organizita por praktikado de Esperanto, kies temo ĉi-foje estis "La Progreso".

La babilado surloke prizorgita de sanino Luz Vazquez, malvolviĝis en la loka kultura institucio "Centro de Lectura". Oni disponigis por ni belan aŭditorion. Denove ni devas plezure anonci, rekordan ĉeeston, nu, al nia alvoko venis pli ol kvindekda gesamideanoj. Novajn vizaĝojn ni vidis, kun la espero, ke ili daŭre akompanos nin.

La temo, jam je la komenco, vekis grandan intereson kiu instigis al diskutado. Estis multaj kaj diversaj intervenoj, kvankam ankoraŭ multaj gesamideanoj restas timemaj paroli publike. Ni esperas, ke iom post iom ili venkos tiun kvazaŭ "malkuraĝiĝon", kio signifos gravan paŝon antaŭen en nia celo.

Unue oni intencis difini, kio estas progreso. Kaj ni venis al la konkludo, ke *progreso* estas plibonigo de la homa vivo. Por atingi tiun stadion de vera progreso, nepre oni devas solvi, ankoraŭ!, multajn problemojn, kiuj estas: ekonomio, kulturo kaj unualoke socia justeco.

Kiel en aliaj debatoj, en Reus ankaŭ troviĝis du tendencoj, unu el ili la idea-

2

lisma, kies celo estas peti al la homaro pli bonan kunvivadon por humanigi la socion, sed ĉi tiuj aprobindaj teorioj neniam montras la vojon irantan al tiu revata sociordo. La alia tendenco, pli pragmata, analizis la progreson sub vidpunkto de la reala nuntempa situacio.

Poste oni eldiris la ideon, ke la progreso havas du, kvazaŭ du fakojn, unu estas tiu, kiun ni konas, kiel materian progreson, nome, la atingojn de la scienco kaj la tekniko. Pri kiu ĉiuj koincidis, ke tiusence la progreso estas vera kaj reala. Je la alia flanko restas la progreso morala, en ĉi tiu punkto ankaŭ la koincido estis granda sed ne komplementa.

La rilatoj inter la homoj estas tiuj ekzistantaj de antaŭ miloj da jaroj, nome, de tiuj, kiuj laboras la plej grandan parton de sia vivo, kaj minoritato, kiu profitas de la rento de tiu laborado. Kvazaŭ konkludon de tiu situacio oni esprimis la opinionon ke nur aŭtenta socialismo, alportos veran egalrajtan progreson por ĉiu homo. Aliaj opiniis, ke malgraŭ la grandaj maljustaĵoj ekzistantaj nuntempe, la homaro multe progresis, kaj oni metis kiel ekzem-plon, la fakton, ke antaŭe estis kanibaloj, sklaveco kaj aliaj negativaj viveroj, kaj nun ne, el kio oni deduktas, ke morale ankaŭ oni avancis. Kelkaj opiniis ke ni, eŭropanoj, analizas la kunvivadon en nia socio, en la

# Boletín

## mi amas vin

mondon, laŭ niaj eŭropaj kriterioj, forgesante la variecon de aliaj aspektoj de la progreso en aliaj lokoj de la mondo, kaj sekve la socialajn diferencojn inter la nomata "nordo" kaj "sudo" kun karakterizoj tute malsimilaj. Oni diris ke la nuna progreso, devenas de la romiaj leĝoj, kiuj disdonis la teron por plej granda produktado, sed tuj sekve alia opiniis, ke ĝuste tiu agado de la romia epoko signifas malprogreson, ĉar oni rajtigis al iuj homoj pri posedaĵoj, dum oni malrajtigis aliajn.

Apartajn komentojn oni dediĉis al la naturo, ja tiu estas temo, kiu prave kaŭzas zorgojn nuntempe al la homo, do parto de la babilado estis dediĉita al la naturo, kio jam okazis en antaŭaj sesioj. Ĉu senkontrola progreso mortigos la naturon?, kaj se ni mortigas la naturon, adiaŭ al la vivo kaj al la progreso. La polucio, la malplibonigo de la atmosfero, la efektoj de la malkovrita truo de ozono, la senarbarigo de multaj zonoj de nia planedo, estas faktoj pli ol maltranĝviligaj.

Sub socia kaj sociala vidpunkto, se la progreso signifas, ke ĉiutage estos pli da senlaboruloj, kaj kiel paralela sekvo minoritato estu pli kaj pli riĉa, la progreso puŝos nin al kompleta katastrofo. Oni konsentis, ke sen justeco, neniel povos ekzisti progreso, laŭ morala vidpunkto. Por ekzisto de vera progreso la homa estajo devos evolui kolektive kaj indvidue pli inteli-gentee. La transformiĝo de la homaro devas do multe dependi de la mensa homa evoluo. Ĉiuj konsentis, ke iom post iom la progreso atingos ĉiujn civitanojn de la mondo, sed neniu kuraĝis diri kiam kaj kiel oni efektivigos

tiun progreson, kvankam tiu dato estas ege malproksima.

La pitoreska momento de la babilado estis, kiam la subskribinto de tiu ĉi Raporto prezentis al la ĉeestantaro la lastan demandon pri la temo: Kiel la Esperanta Movado kontribuas al la progreso? Nu, la silento fariĝis kompleta, ja neniu respondo oni aŭdis. Aparte de kelkaj mencioj pri la homaranismo de Zamenhof, apenaŭ oni balbutis firmajn opiniojn pri la rolo de Esperanto tiusence. Fine, la subskribinto konsideris, ke nia kontribuo al la progreso povas kuŝi en la forigo de lingvaj konfliktoj, en la helpo al la interkompreno de la homoj kiuj povas eviti miskomprenojn kaj en gravaj situacioj eĉ militojn, kaj sub ekonomia vidpunkto, kam oni konstatis la fakton, ke per neŭtrala lingvo kia Esperanto, kolektivo de nacioj plurlingvaj povas efike kontribui eviti tiujn astronomajn elspezojn en tradukoj kaj interpretistoj ne ĉiam seneraraj se oni decidus adopti ĝin, ĉiam sub nia slogano: "ĉiu homo uzos sian lingvon, kaj Esperanto por ĉiuj".

Kiel en antaŭaj okazoj, ĉiuj ĉeestantoj estis malavare regalataj per abundaj manĝaĵoj kaj refreŝigaj trinkaĵoj pro ĝentileco de la gastiganta institucio. Fine, grandparte el la ĉeestantoj kunmanĝis en frateca etoso. Plenumiĝis tre kontentige la celo de nia babilado-kunveno, t.e., la praktikado de la lingvo Esperanto, kaj ankaŭ tiu alia konsistanta diskonigi la popolon, en tiu ĉi kazo en Reus, vivosignon pri nia ekzistado. Feliĉe, ambaŭ celoj, sukcese!


Luis Serrano Pérez

## 6a I.T.S en Malto

La 6a Internacia Turisma Semajno okazos de la 3a ĝis la 9a de septembro 1997. Oni jam anoncas tre interesan programon: prelegoj, ekskursoj, vizitoj al interesaj turismaj lokoj. Informoj: Malta Esperanto-Societo; P.O. Box 142. Valletta — CMR 01. Malto.

## Interesa dokumento

Eldonita de UEA aperis “Monumente pri Esperanto” verkita de Hugo Röllinger, ilustrita dokumentaro pri



1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj (ZEOj) en 54 landoj. Dum 30 jaroj Hugo Röllinger serĉis kaj dokumentis ZEOjn: listoj de placoj, avenuoj, stratoj, monu-

mentoj, parkoj, kulturcentroj, asteroidoj ktp., estas rigore kompilitaj en tiu ĉi libro, kiu vere meritas la plej fervoran dankon de la esperantistaro, ĉar fakte ĝi estas, publika rekono al Esperanto kiel kultura elemento de nia socio. Speciale interesa por ni, hispanoj, estas la kronikoj pri la unuaj stratoj inaŭguritaj en Sabadell kaj Terrassa (inter la unuaj de



la mondo) kaj “Strato de l’ esperantisto Luis Hernández Lahuerta”, ĉefredaktoro, unue de “Popola Fronto” kaj poste de “Boletín”. Röllinger estis honorigita per la bronza Zamenhof-medalo dum lia restado en Tenerifo (Kanariaj Insuloj) kiel invitito de D-ro Juan Régulo Pérez...

Ni dankas nian samideanon Röllinger pro tiu meritoplena senlaca laboro kaj gratulas lin, ĉar krom la merito de la libro instigas aliajn esperantistojn daŭrigi tiun gravan taskon.

## DEZIRAS KORESPONDI

38-jara finna fraŭlo deziras korespondadi kun 30 ĝis 38-jara virino. Mi serĉas veran amikinion aŭ vivkunulion kaj ŝatas sportojn, filatelion, kolekti bildkartojn, aŭskulti bonan muzikon kaj studi lingvojn. Mi deziras ricevi korespondon kiel eble plej baldaŭ, se eble en Esperanto aŭ en la hispana lingvo. Mia adreso: Tapani Lappalainen; Kivalaktotykytö, FIN-37500 Lempiöölö, Finnlando.

33-jara esperantisto, laboranta en elektrolampa uzino, interesiĝas korespondadi pri turismo kaj kanoto-sporto krom kulturaj temoj. Gefiloj studas la hispanan lingvon. Adreso: O.R. Feoktistov; TVER-regiono. 171210-Ljoslavl, a/r9. ROSSIA. Rusia.



# 4 AMIKO JUAN CARLOS

*Aŭgusto Casquero.*

Kiam ankoraŭ estas freŝa en nia memoro la terura novaĵo de la forpaso de nia kara Ada Fighiera, Juan Carlos, vi lasas nin orfaj je vi, kiam vi estas en la floro de via vivo, kaj kiam ĉiuj plej bezonas vin. La lan de februaro, post krue-la malsano, kontraŭ kiu vi kuraĝe batalis, kaj ĉirkaŭate de viaj multegaj amikoj kaj familianoj, vi foriris, nur 43-jara.

Mi ankoraŭ rememoras kiam, en la jaro 1977, do, jam 20 neforgeseblaj jaroj pasis, vi, kune kun via kara Maribel (poste via edzino), kun Pedro Vilaroig (kun kiu vi fondis la ĥoron "Verda Stelo", (nun prestiĝa kaj altnivela), kaj aliaj junaj amikoj, subite aperis en la tiama aĉa sidejo de Madrida Esperanta Liceo, por lerni Esperanton. Ekde tiam la vivo de la Liceo, kaj nia vivo, tute ŝanĝiĝis. Nova freŝa aero venis. Kio estis nur asocio transformiĝis al familio. Vi alportis krom via ĉiam konstanta kaj entuziasma laboro, ion multe pli gravan: amikecon, bonan humoron, solidarecon, brilajn interesajn projektojn.

Ekde tiam mi havis vin kiel ekzemplon. Vi kaj viaj amikoj estis homoj kun eksterordinaraj kondiĉoj: kleraj, inteligentaj, laboremaj, imagplenaj, kaj mi multe lernis de vi.

Ofte, preskaŭ ĉiun semajnofinon, ni komencis iri al la montaro aŭ al malproksimaj lokoj, por tendumi, koni la mirin-

daĵojn de la naturo, ĉiam per niaj aĉaj aŭtomobiloj, niaj dorsosakoj kaj niaj tendoj. Tio kreis ke nia asocio estu ĉiam plena je homoj, kaj fariĝu kvazaŭ ilia dua hejmo. En grandaj junaj grupoj ni komencis viziti la naciajn kaj internaciajn kongresojn, renkontiĝojn, kaj ĉian esperantan aranĝon, en kiuj la juna grupo de Madrida Esperanta Liceo neniam mankis, kaj donis brilon kaj gajecon. Ĉefe vi, nia gvidanto, kiu rapide kreis bonhumoran etoson, kaj tuj estis la centro de ĉiu kunveno, pro via simpatio kaj laboremo. Neniam mankis via speciala maniero kanti "Granada", ĉiam sukcesa enlande kaj eksterlande. Kaj neniam mankis via ĉiama saluto "Feliĉan Paskon", dum la tuta jaro, kaj via disdono de gumaj globoj al la infanaro.


La hispana movado estis en granda parto ŝanĝita de vi, ĉar pere de vi multaj esperantistoj, inter ili mi mem, lernis kiel ŝanĝi la tro oficialecan kaj seriozan manieron funkcii, al alia, pli agrabla familia. Tiun laboron ni konservos kiel nian ĉefan heredajon havigitan de vi, kaj pere de ĝi vi estos ĉiam kun ni, ĉiam en nia memoro, kaj kvankam tristaj, ni restas dankemaj kaj pensos ĉiam pri vi kaj kaj pri via personeco, kaj pensante kiom vi donis al ni ĉiuj ni klopodos ĉiam sekvi vian ekzemplon. Vi ĉiam estos la pruvo ke idealismo, altruismo, solidareco, ankoraŭ ekzistas, kaj ke ĉiam ekzistos homoj kiuj donos ĉion por la bono de la

homaro, klopodante ke la mondo estu pli agrabla, pli solidara, pli justa.

Kaj, kion diri pri via, ni diru, oficiala biografio, impona en tiom da malmultaj jaroj. Doktoro inĝeniero pri Minoj. Sciencisto de C.S.I.C. Vi produktis 42 sciencajn verkojn, enlande kaj eksterlande. Unu libron pri bibliografia esplorado kaj 19 monografiojn pri la sama temo. Kunlaboranto de multaj universitatoj de la tuta mondo. Tri patentojn sciencajn kaj 46 verkojn

de teknologia apogo. 65 verkojn prezentitajn en sciencaj kongresoj naciaj kaj internaciaj. Diplomito en "Eŭropaj Komunumoj", kaj en la Diplomatika Fako. Partopreno en 28 programoj de esplorado kun C.S.I.C., krom 6 de la Eŭropa Unio. Gvidanto de diversaj doktoriĝoj, inter kiuj, bedaŭrinde troviĝas la mia mem, por kiu mi bezonis vian konstantan helpon, kaj kiun mi nepre deziras fini kiel rememoro al vi, mia plej bona amiko kaj gvidanto. Konsilanto de la Ministerio pri Industrio en la Eŭropa Programo EURAM. Sed, ĉar via «nur simpligita» faka biografio postulus pli ol tri paĝojn, ni parolu pri via esperantista aktivado.

Vi esperantistiĝis en Madrido, en 1977. Partoprenanto en multaj kongresoj, inter kiuj citindas la hispanaj en León, Gijón, Málaga, Bilbao, du en Madrido, Zaragoza, Valencia, Sant Cugat, Murcia, Salou. La internaciaj de Antwertpeno, Lovaina, Varsovia kaj Valencia. Ĉiam kun aktiva partopreno, kaj neniam kiel nura aŭskultanto. Ok jarojn Vicprezidanto de Madrida Esperanto Li-



ceo, ties nuntempa Prezidanto (entute 16 jarojn kiel membro de la estraro).

Prezidanto de la Hispana Kongreso de Esperanto en 1980, kaj Vicprezidanto en 1987. Vicprezidanto kaj vera motoro de la L.K.K. de la Universala Esperanto-Kongreso, en Valencia en

1993. Inter viaj multaj esperantistaj verkoj ni devas menciigi vian grandan laboron en la traduko de polifoniaj kantoj al Esperanto. Verkojn prezentitajn en la Hispana Esperanto-Kongreso de Gijón pri "Civitana partopreno kaj Esperanto"; en tiu de Bilbao pri "Asocioj kun Publika Utileco". Redaktado de la nova statuto de Madrida Esperanto Liceo 1979. Amason da artikoloj en Esperanto en la gazetaro nacia kaj internacia. Tekston vian, en Esperanto por la "Himno de Madrida Esperanto Liceo". La verkon "Datos sobre el Movimiento Esperantista 1887-1987". La Dosieron por atingi la deklaron de "Publika Utileco" por Hispana Esperanto-Federacio, atingita de la Hispana Konsilio de Ministroj en aŭgusto 1993. Kaj multe pli. Maribel Alonso, via kara edzino, ricevis en 1995 la merititan premion "Klara Silbernik", pro ŝia konstanta apogo al vi, kaj pro ŝia multjara laboro por Esperanto.

Tamen, via plej granda kontribuo estis via konstanta laboro. Instruisto, verkisto, oficisto, organizanto, balaisto, masonisto, farbisto, portisto, ĉion vi faris en nia movado kun ridetanta mieno, sen plendoj, en labortagoj kaj en festotagoj, sole aŭ akompanate, sed kutime

ĉirkaŭate de viaj multaj amikoj, kiuj kiam temis pri vi, ĉiam estis pretaj kunlabori, ĉar kun vi laboro transformiĝis en amuziĝon, kaj kie vi estis ĉiam regis paco, harmonio kaj bona humoro.

Kara Juan Carlos. Mi scias ke vi ĉiam estos kun ni ĉar via ekzemplo restas. Kaj kun via edzino kaj gefiletoj, niaj karaj Maribel, Sergio kaj Bárbara, kiuj havis la feliĉon, kvankam mallongan, havi vin kiel edzon kaj kiel patron, kaj ĉefe kiel amikon.

Kara Juan Carlos, ĝis revido ie, iam!

## Kanaria eŭrodeputitino en Venezuelo

Juan NEGRETE

*Prof. Centra Universitato de Venezuelo*

Okaze de la agrabla vizito al la socio-  
to "Kanaria Venezuela Hejmo" de la D-  
rino Angela Sierra, profesorino pri his-  
torio kaj politika-socia filozofio de la  
Universitato de La Laguna (Kanariaj In-  
suloj), ŝi prelegis en tiu Karakasa rondo  
pri la temo "Kanarioj en Venezuelo kaj  
en la Eŭropa Komunumo". Ŝi, kiel de-  
putitino reprezentanta Hispanion en la  
Eŭropa Parlamento komentis, la novan  
ekonomian situacion tuj adoptonta la  
E.U. rilate al Kanariaj Insuloj, kiu apro-  
bis specialan Statuton de nun aplikatan  
en la rilatoj inter la E.U. kaj tiuj Insuloj.

Inter la respondoj kiujn la prelegan-  
tino donis al la diversaj demandantoj  
ĉeestantaj en la prelego, elstaras la sim-  
pati-impreson kiun ŝi perceptis en me-  
dioj de la E.U. al Kanariaj Insuloj, ĝis  
tiagrado, ke oni aprobis specialan Statu-  
ton kun tre favoraj fiskaj kaj doganaj  
kondiĉoj signifantaj privilegiajn nor-  
mojn, ĉar per ili, Kanariaj Insuloj, restas  
kiel teritorio speciale interesa por eston-  
taj projektoj, oni difinis ĝin limolinio de  
Eŭropo, ĝi estas trafe taksata kiel riĉa  
startpunkto transoceana pro ĝia strategia  
situo kaj brila ponto de la Atlantiko por  
la transoceana komerco.

D-rino Sierra emfazis la ekonomian  
kreskiĝon de Kanariaj Insuloj (4%), cer-  
te unu el la plej altaj de la hispanaj teri-  
torioj, kvankam maltrankviligas ŝin la  
fakto pri la alta nombro de senlaboruloj  
(+ 10%), sendube pro certa industria  
izoleco, produkto de ne varia entrepren-  
ninciato. Tamen, Kanarioj konfirmiĝis  
kiel potenca turisma industrio. Oni ko-  
mentis ankaŭ la socian situacion de la  
kanaria virino, kies temprofundigon oni  
lasis por venonta projektita kunveno.


Kiam la prelego ŝajnis serĉi sian fi-  
niĝon, iu, (la verkanto de tiu ĉi artikolo)  
kaj post sugesto de unu el la aŭskultantoj  
kiu opiniis ke la kanarianoj devus mo-  
dernigi sin per lernado de lingvoj, am-  
pleksigis la temon prezentante la proble-  
mon pri la lingvoj kiel veran Babelturon  
de la E.U.

D-rino Sierra agnoskis tuj ke, efektive,  
tiu estis unu el la problemoj plej  
gravaj de la Eŭropa Unio por atingi ve-  
ran integriĝon socian, politikan kaj eko-  
nomian: kun 12 oficialaj lingvoj kaj 3  
pliaj de landoj baldaŭ aliĝontaj, la E.U.

aperas kiel aŭtenta Babelturo kies strukturo, funkciado kaj normala evoluo malfacile progresas ĉar mankas la flua interkompreno kiun prezentas la interkomunikado pro neadekvata uzo de lingvoj. Ŝi, agnoskis ke malgraŭ la ĝenerala konscio pri tiu problemo, oni ne antaŭvidas rapidajn ŝanĝojn tiurilate. La problemo estas tre grava se ni analizas almenaŭ du aspektojn:

1) *La dimension socian*, ĉar se oni volas krei supernacian ŝtaton estas tre malfacile atingi ĝustan integriĝon ene de la lingva plureco jam ekzistanta. La solvo de tiu problemo proponita de kelkaj kaj fuŝe nun funkcianta estas doni privilegion oficialan rolon al unu, du aŭ tri lingvoj, sed evidentas ke tiu solvo estas kontraŭkonstitucia, kontraŭdemokrata kaj eĉ ofendema por la restantaj nacioj kaj kulturoj, maljusta solvo kiu postulas starigi perforte kondiĉojn de unuj super la aliaj, kio nepre kondukos la Union al fiasko.

2) *La dimension ekonomikan*, ĉar laŭ prave proklamis D-rino Sierra, la uzo de pluraj lingvoj signifas teruran elspezon. Kaj kvankam ŝi ne precizigis ian ajn ciferon, oni scias ke la 30% el la buĝeto de la E.U. oni elspezas en tradukoj, interpretistoj kaj substrukturo de tiu fako, kvankam fakte neniu restas kontenta kun ties rezultoj. Kaj ĉar la tradukoj plejofte ne estas seneraraj kaj eĉ estas motivo de gravaj miskomprenoj, la funkciuloj kaj membroj el la laborkomisionoj ironie nomas tiun elspezon “la kostoj de la nekomunikado”.



Teorie, ĉiuj lingvoj de la E.U.-membroj kaj ties kulturoj estas egalrajtaj, sed fakte tio ne estas vero, ĉar la laborkomisionoj nur uzas du lingvojn: la anglan kaj la francan. Kio ne estas leĝe ĝusta. La hispana lingvo, kvankam ĝuas bonan sanon en la tuta mondo, en la E.U. ne elstaras inter la unuaj: ne temas pri gramatiko aŭ esprimokapablo, estas ja afero politika.

Plej racia solvo de la problemo estus ke la E.U. akceptus neŭtralan helpan lingvon, t. e., ne etnan lingvon. Kaj la nura ekzistanta jam de antaŭ unu jarcento en la mondo estas Esperanto, naskiĝinta en la sino de la Eŭropa kulturo. Tiu ĉi racia solvo estus la plej justa, ĉar aŭtomate restarigus la egalecon de lingvoj kaj kulturoj de la membroj kaj forigus la nunajn maljustajn diskriminaciojn kaj privilegiojn, kio reale estas lingvoimperiismo.

La Eŭropa Parlamento ne estas indiferenta al la starigo de neŭtrala lingvo kaj konkrete al la akcepto de Esperanto kiel helpa lingvo, kaj jam alta nombro de Eŭroparlamentanoj konsultitaj opiniis favore al ĝi, kaj tio multe gravas, ĉar la naciisma solvo de unu sola etna lingvo por ĉiuj restis tute senprestigiĝita, eĉ en la lando mem kies lingvo estos probable elektita.

La prelego en la centro “Kanaria Venezuela Hejmo” de la kanaria Eŭrodeputitino D-rino Angela Sierra, vekis en kelkaj kulturaj Venezuelaj medioj veran intereson pri problemoj en kiu aktivas Kanariaj Insuloj kaj ĝenerale Hispanio, inter ili Esperanto, temo kiu

aktualigas la absolutan bezonon revigli-  
gi la lingvan konscion por starigo de  
neŭtrala lingvo uzebla de ĉiuj popoloj de  
la mondo. Esperanto restas kiel kandida-  
to pli adekvata  
por tiu celo.

**56a HK**

**Retadreso:**

a-casquero@redestb.es

**Paĝo en Internet:**

redestb.es/personal/a-casquero

## Nekrologoj

Kun bedaŭro ni informas niajn le-  
gantojn pri la forpaso la 11an de pasinta  
aprilo de s-ino Aurora Moya Teixidó,  
filino de nia estimata kunlabo-ranto kaj  
amiko Giordano Moya Escayola. La  
Redaktejo de *Boletín* esprimas nian plej  
sinceran kondolencon al nia samideano  
Giordano kaj familio. *Ŝi pace ripozu!*

Ankaŭ ni ricevis la tristan novaĵon  
pri la forpaso en Valladolid, la 6an de  
februaro, de Francisco Castañón Mar-  
cos, membro de la loka Grupo kaj de  
HEF, kelkfoje partoprenanta en la His-  
panaj Kongresoj.

Kaj la 2an de aprilo forpasis, vik-  
timo de akcidento, Patricio de Fuentes  
Valbuena, karmelita pastro kaj profesoro  
en la Kolegio San Juan de la Cruz.  
Pastro de Fuentes y Valbuena, efike kaj  
fervore kontribuis al la sukceso de la  
38an Hispana Kongreso de Esperanto  
okazinta en Leono, kaj verkis artikolojn  
pri diversaj temoj statempoj aperintaj en  
*Boletín*.

Ni kondolencas al la familioj de la  
forpasintaj samideanoj kaj deziras al  
ambaŭ pacan ripozon!

## Forpaso de elstara esperantisto

Lastmomente oni telefonas al nia  
Redaktejo por informi nin pri la forpaso  
de nia samideano kaj amiko Francisco  
ZARAGOZA RUIZ. Instruisto, veterana  
propagandisto de Esperanto, li fon-  
dis la Esperanto-Grupon de Callosa de  
Segura en 1932. Li ekziligis en Belgio  
post la intercivitana hispana milito sed  
en neniu momento forlasis la porespe-  
rantistan aktivadon. Reveninta en His-  
panion kaj plene konvinkita pri la gra-  
veco de la instrua tasko kaj klerigo de  
la instruistoj de esperanto, li fondis or-  
ganizojn "Esperanto per Koresponda-  
do" speciale por instruistoj, en la kadro  
kaj celoj de ILEI, kaj per ĝi li malvolvis  
tre gravan instruan taskon en la Hispa-  
na Esperanta Movado. Dum jaroj li es-  
tis estrarano de ILEI, kiun li reprezentis  
en nia lando tre efike. Francisco Zara-  
goza estas aŭtoro de esperanta grama-  
tiko *Esperanto-lingvo por ĉiuj, kaj Per-  
frazo metodo*.

Ni kondolencas tutkore lian edzi-  
non kaj filojn.

**Libroservo de HEF: Apartado 119, 47080 Valladolid**

# La signifo de Avempace en filozofio

29

Antonio Marco Botella

Unu el la plej altaj pintoj de la sciado en Al-Andalus pri medicino, filozofio, muziko, astronomio kaj poezio estis Abŝ Bakr Muhammäd ibn Yahyá ib al-Asaig ibn Bă\_a, nomata de skolastikanoj *Avempace*. Li naskiĝis en Zaragozo ĉirkaŭ la jaro 1085-1090 en la sino de modesta familio. Ĉiuj elstaraj historiistoj de tiu epoko koincidas en la opinio ke li estis speciale dotita por la muziko, same kiel komponisto kiel kantisto: li verkis lernolibron pri muziko, kiu, laŭ la fama historiisto al-Maqqari, superis ĉiujn sistemojn pri muziko ĝis tiu momento konitajn, eĉ tiun mondfaman verkitan de al-Färabi. Li verkis kanzonojn kaj poemojn kaj la eminenta hispana arabisto kaj akademiano García Gómez (antaŭ ne longe forpasinta) opiniis post dedukto el certa versio de la verko *Tifasi*, ke li inventis la zegelon, versiformo kiu tiom influis en la naskiĝo de la liriko de tiom da modernaj lingvoj. Multaj profiloj el la viveroj de Avempace kiel granda poeto ni jam priskribis en la verko *Lirikaj perloj de Al-Andalus*, antologio originale verkita en Esperanto. Hodiaŭ ni publikigas kelkajn aspektojn pri lia signifo kiel filozofa, kiun trafe esprimis la katedra profesoro pri Filologio kaj Semantiko de la Universitatoj de Madrido, Granado kaj nun de Zaragozo, D-ro Joaquin Lomba Fuen-

tes, dedukte eltirita el antikva manuskripto aperinta en la arkivo de El Escorial (Madrid), per kies traduko el la araba lingvo li publikigis en 1989 kompletan monografion titolitan *Avempace*, en kiu li rezonas pri la signifo de tiu ĉi filozofa en la historio de la filozofio kaj ĝenerale kiel intelektulo dum la mezepoko. Jen kion li diris en tiu aspekto pri la eminenta Ibn Bă\_a:

«La figuro de Ibn Bă\_a, konata en Okcidento per la nomo Avempace (1085-1138), ne nur estas unu el la plej gravaj intelektuloj de la historio de Zaragozo komparebla al Servet, Ramón y Cajal aŭ Goya, sed ankaŭ meritoplena homo inda okupi elstaran lokon en la historio de la universala pensado. Tamen, li estas apenaŭ konata, escepte de specialistoj en lia plurfaceta intelekta aktivado. La kaŭzo de tiu forgeso estas diversa: unu, ĉar li apartenas al la islama epoko de nia pasinteco, kaj tio ŝajnas esti sufiĉa motivo por ke lia intelekta figuro devu malaperi de nia memoro kiel eble plej baldaŭ, pro certa stranga komplekso kiu obskurigas la verajn meritojn de la intelektuloj de tiu glora epoko, eĉ kiu la tiama scienco de Okcidento nur floris en Iberio, tiam nomata Al-Andalus, komplekso malfacile eksplikebla, kiu puŝis niajn modernajn historiistojn bari la intereson por la esplorado kaj eĉ la atentopordojn pri faktoj, personoj kaj libroj meritoplenaj ŝanĝe de personoj,

eventoj kaj verkoj kiuj ofte ne preterpasas mezbonan nivelon.

**O** Alia kaŭzo de tiu forgeso estas, ke dum la tuta periodo de la islama Hispanio, la figuro de la kordovano Averroeso, disciplo de *Avempace*, iamaniere obskurigis la intelektan brilon de sia majstro, kaj aŭtomate *Avempace* iĝis “de unua pura filozofo de tuta epoko” al simpla *antaŭulo* de la eminenta Averroeso kaj “balbutanto” de liaj postaj filozofiaj teorioj, forgesante ke la zaragozano havas tre interesajn ideojn pri tiu fako, kaj sendube sen la bazaj teorioj de *Avempace*, tre probable, ne estus ekzistinta la majstreco de Averroeso. Fakte, la kordovano, agnoskante la scion kiun li ŝuldis al sia antaŭulo, montras sian dankemon al li citante en sia verkaro la pensojn de la zaragozano pli ol iu ajn alia verkisto, kompreneble escepte de Aristotelo. Fine, ni menciuj kiel alian kaŭzon pri la forgeso de *Avempace*, la malfacilon trovi dokumentojn kaj verkojn de la zaragozano dum pluraj jarcentoj.

Je la komenco de la nuna jarcento, la talenta arabisto Miguel Asín Palacios, malkovris kelkajn manuskriptojn de *Avempace* kiujn li tradukis kaj publikigis. Cetere, ekster nia lando kaj jam de antaŭ jardeko, multaj sciencist-eksploristoj okupiĝas pri la verkoj de la eminenta zaragozano, kies aŭtentaj profiloj jam ekaperas publike, same en la okcidenta kiel en la muzulmana mondo...

Kiuj estas la veraj meritoj de *Avempace*, homo tiel maljuste forgesita eĉ en sia naskiĝurbo mem? Ni eksplikos iom supraĵe tiujn meritojn en tri punktoj:

Unue.— *Avempace* estas la unua

vera filozofo aperinta en la muzulmana okcidento. Certe, ke antaŭ ol li, ekzistis figuroj tiel elstaraj kiel estis Ibn Masarra aŭ Ibn Hazm de Kordovo, kiuj alportis grandajn valorojn al la filozofio, sed reale oni povas certigi ke temis pri fakuloj en teologio, mistiko, juro, historio k.a., kiuj, samtempe filozofiis. Sed striktaj filozofoj, laŭ la grekaj karakterizoj, specife dediĉitaj al la filozofio sen iu ajn alia scienco, ekzistis neniu ĝis la apero de *Avempace*. Post li sekvis liajn spurojn Averroeso, konstruante filozofion, kiun profitos grandparte Sankta Tomaso de Akino kaj la kristana Okcidento.

Mi diris, ke li estis la unua filozofo de la muzulmana Okcidento. Sed rilate al la tuta Okcidento, t.e. la kristana, muzulmana kaj juda, li estis la dua filozofo. Kaj gravas tion substreki, ĉar la unua estis juda, naskiĝinta en Malago sed loĝanta ekde sia infaneco en Zaragozo. Temas pri Ibn Găbirol (1020-1059), aŭtoro de gravaj verkoj, inter ili “La perfekteco de la karakteroj”, verkita en Zaragozo en 1045, kaj la fama filozofia verko “Yambŝ al hayât”, “La fonto de la vivo”. Tiu ĉi libro laste menciita, strikta filozofia verko, inspiriĝis en la novplatonana filozofio, kiu, diference al tiu de *Avempace* estas precipe surbaze aristotela.

Due, kaj intime ligita al la antaŭa punkto, *Avempace* estis la unua komentanto en la tuta Okcidento (kristana, muzulmana kaj juda) de la verkaro de Aristotelo. Kaj ne nur tio, sed oni povas ankaŭ aserti sen timo al craro, ke li verkis la unuan filozofion konstruitan en Okcidento laŭ la normoj de Aristotelo mem.

Tiun lastan aserton oni devas firme emfazi, ĉar Avempace konstruas pensadon laŭ aristotela stilo, sed kun multaj aliaj elementoj kiuj faras ĝin speciale originala kaj propra. Tiu originala komentmaniero prijuĝi la filozofion de Aristotelo kaj konstrui ĝin laŭ tiu specifa stilo estas speciale grava.

La muzulmana kaj kristana filozofio malvolviĝis de sia komenco laŭ skemoj novplatonaj. Tio signifas ke en filozofio regis la elemento intua, mistika kaj laŭvola super tiu strikte racia, krom tio, la mondo estis rigardata ne en si mem, en sia racia strukturo, sed de trans alia mondo de Unu-Dio. Sed en tiu kampo, en kiu la aŭtoritatoj estis Platono, Plotino kaj ceteraj novplatonaj filozofoj, la figuro de Aristotelo estis rigardata kiel la lasta idealo atingebla, kvazaŭ la plej alta pinto el la scio. Aristotelo reprezentas la logikan ordon, la racian metodon, la analizon de la mondo laŭ ĝia strukturo fizika kaj metafizika rigore raciaj. Fine, Aristotelo, subtenis la ideon pri la mondoeterneco (kontraŭ la dogmo de la kreo de la mondo fare de Dio), kaj metis en danĝeron la senmortecon de la animo, ĉar tro centriĝas en mondo strikte materiala.

La figuro de la kontraŭaristotelismo kaj kontraŭfilozofio estis al-Gazzali (1058-1111) kiu verkis la faman "Tahäfut al-falasifa" (Detruo de la filozofoj). Post al-Gazzali la islama orienta filozofio jam ne plu okupiĝis pri Aristotelo kaj plene sin dediĉis al spekulativa de novaj primistikaj sufiteorioj (\*). La granda majstro de la orienta sufipensado estis Suhra-wardi (1154-1191). Kaj ĝuste en tiu momento, je la fino de

la 11a jc. kaj komenco de la 12a, aperas Avempace en Okcidento, klamanta kontraŭ la teorioj de al-Gazzali, defendanta la filozofion kaj trairanta la vojon komencita de al-Kindi, al-Farabi kaj ibn Sinä. Konstrua vojo unualoke strikte filozofieca, kaj due priaristotela.

Tiun vojon trairos lia posteulo, la kordovano Averroeso (1126-1198), kiu, inter aliaj libroj verkos sian "Tahäfut al-tahäfut" (Detruo de la detruo) kontraŭ la menciita verko de al-Gazzali. Poste, Averroeso, ripetos en la muzulmana Okcidento, t.e. en Al-Andalus, historion similan al la orienta: Ibn Arabi de Murcio (1165-1240) elstaros kiel la universala granda majstro de la sufismo, sepultante por ĉiam la aristotelismon kaj la filozofion.

Sed same kiel Averroeso sekvas la raciisman aristotelan vojon de Avempace, ankaŭ ni povas diri, ke la granda kontraŭulo de la okcidenta raciismo, Ibn Arabi, sekvas ankaŭ la mistikan linion komencintan de Avempace. Ĉar tiu estas la tria punkto kiu konformas la unuavicecan figuron de Avempace: unuasoje li kunigas en Okcidento la aristotelan raciismon kun la mistiko» (\*\*).

Tiu estas la signifo de la granda zaragoza majstro Avempace kiu, fakte forgesita, sin prezentas kiel centra figuro en la historio de la universala alandalusa muzulmana pensado. Lia filozofistilo raciisma kaj mistika aŭ mistika-raciisma, povas sin prezenti kiel modelon en la aktuala okcidenta nuntempo. En momentoj kiam en Okcidento oni debatas ene de la retoj de sia propra raciismo sciencajn, teknikajn k.a. inter la krizoj de tiu rezonado starigita kiel absoluta



gvidlinio de la homaro, la racia islama mistikismo de Avempace povas transformiĝi en profundan alvokon de aliaj dimensioj de la persono, kiaj estas la amo, la intuo, la ekstazo k.a. Ĉar Avempace havis profundan amon por la scienco, ĉar li mem estis elstara kuracisto, astronomo, muzikisto kaj lerta reganto de aliaj sciencoj, kiujn li kunigis kun aliaj superraciaj kaj mistikaj kapabloj, kaj tio ebligis al li la komprenon de la tuta realo homa kaj kosma. Ekde tiu momento ni povos diagnozi nian okcidentan raciisman pasinton inklinan al la propraj kontraŭdiroj de la rezonado kiun ni hodiaŭ suferas.

(\*) Sufismo: Sufismo estas mistika tendenco el islamo. Laŭ kelkaj ĝi devenas el la filozofioj kaj mistikaj religioj ekstremorientaj aŭ persaj, laŭ aliaj el kontakto kun la kristanismo, fine, laŭ aliaj, probable estas propra praprodukto el islamo. Ĝia esenco konsistas en la defendo de itinero iranta al Dio, tre praktika kaj nepre interna, ĉe kies fino oni trovas la mistikan kaj aman union kun la dieco. Cetere, ĝi sin montras speciala refrakta same al la pura spekulado filozofia aŭ intelekta kiel al la religio simpligita al nekomplikaj eksteraj uzoj aŭ ritoj.

La sufismo dividigas laŭ multnombraj skoloj, kiuj havas gravajn reprezentantojn ekde la unuaj momentoj de la naskiĝo el islamo. En Al-Andalus, la plej grava reprezentanto estis Ibn Masarra (883-931). Ĝenerale, oni povas distingi inter la praktika sufismo, kiu sin montras kiel pragmata sekvo de mistika vojo, kaj alia pli intelektualigita kiel tiu de Suhrawardi en Oriento kaj tiu de Ibn Arabi de Murcio en Okcidento. La sufismo malvolvos gravan rolon en la spirita kaj kultura historio de l' islamo.

(\*\*) Elstara hispana arabisto kiu legis

mian verkon *Lirikaj perloj de Al-Andalus*, originale verkitan en Esperanto, adresis al mi leteron indikantan la didaktan konvenon ekspliki al la legantaro de mia menciita verko, aldonan tekston al la biografio kiun mi priskribas en la menciita poezia antologio, pri la signifo de Avempace sub filozofia vidpunkto, ja mi nur emfazas en mia libro viverojn de Ibn Bā\_\_ä kiel poeto. Ĉar mi ne pensas, en tiu ĉi momento, reeldoni triafoje mian verkon, mi decidis verki artikolon priskribantan tiun aspekton pri Avempace, sendube tre interesan.

## HEF

### estas novaĵo!

La revuo *Neĵmani@* faras komenton pri la TTT-ejo de HEF en sia junio numero. En la 4a paĝo (tuj, tuj post la indekso) la unua novaĵo tekstas:

#### EL IDIOMA DEL MUNDO

Un equipo de filólogos, diseñadores e informáticos ha elaborado un nuevo sitio en Internet en la dirección: <http://home.adv.es/esperanto> con el objeto de presentar al público interesado información objetiva y de calidad sobre el idioma esperanto y su cultura.

Poste, en la 82a paĝo, en paĝo nomita Bookmarks (fakta listo de ĉiuj TTT-ejoj prikomentitaj en la revuo) simple legeblas:

Esperanto <http://home.adv.es/esperanto>

